Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 18-an de aprilo 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 14-an de marto 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

**3. Stato de Esperantonia**
Claude ricevis aliron al "vibbo", kio ebligas legi mesaĝojn de la loĝkomunumo. Prefere ankaŭ reprezentanto de la klubo de Oslo havu tian aliron. La 4-an de aprilo okazis komuna kunveno kun reprezentantoj de la Esperanto-klubo de Oslo (rigardu apartan, neformalan raporton).

**4. Peto al Uhlen por Norvega Esperantisto**
Ni decidis peti subtenon de la fondaĵo Uhlen por kreskantaj kostoj de Norvega Esperantisto. Claude formulos la petleteron.

**5. Envenantaj novaĵleteroj**
NEL ricevas multajn retajn novaĵleterojn, kiuj nun apenaŭ havas rektan utilon. Tamen ŝajnas prudente ne malaboni ilin, pro eblaj estontaj interesiĝantoj.

**6. Unesco-kampanjo**
UEA (Renato Corsetti) admonas landajn asociojn de UEA agadi por ke naciaj Unesco-delegacioj deklaru la 26-an de julio tago de Esperanto. Ni prokrastu tion ĝis iu alia lando estos farinta iniciaton.

**7. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**
Ni skribos al la Nacia Biblioteko: Norsk Esperanto-Forbund har hatt styremøte, og tok opp spørsmålet om tilgangen til tidsskriftet Norvega Esperantisto via nettbiblioteket til Nasjonalbiblioteket. Vi vil gjerne gi open tilgang til norske IP-adresser, med unntak av utgjevingar som er under 12 månader gamle. Utgåver som sperrefristen gjeld for, må likevel gjerne vere tilgjengelege for innlogga forskarar, slik som er tilfellet med dei fleste utgåvene i dag.
Krome ni esploru, ĉu ni posedas la jarkolektojn 1916-21, kiuj mankas en la Nacia Biblioteko.

**8. Jarraporto 2023**
Claude proponos simpligon de la formato de la jarraportoj. La jarraporto aperu en N.E. n-ro 2 aŭ 3.

**9. Jarkalkulo 2023**
La estraro traktisk la jarkalkulon kaj la revizoran raporton sen aldonaj rimarkoj. Ni subtenas la opinion, ke ni uzu la impostan valoron (ligningsverdi) de Esperantonia en la jarkalkuloj.

**10. Diversaj proponoj de Claude**
* **N.E. en la retejo esperanto.no**: En la retejo aperu ligilo al Nacia Biblioteko, kie N.E. estos alirebla.
* **Grasrotandelen**: Ni registru NEL per la minimumaj informoj por ricevi monon tra Grasrotandelen.
* **Jarkalkuloj kaj kasaj dokumentoj de NJE**: Hilde Bye, la lasta kasisto de NJE, proponas transdoni al ni malnovajn jarkalkulojn de NJE. Ni akceptos, kaj ni stokos ilin en Esperantonia.
* **Novaj tarifoj, ekzemple por reta abono de N.E.** : Tio eventuale estu traktata dum landa kunveno.
* **Ricevantoj de la novaĵleteroj:** Iu ajn deziranto povu ricevadi ĝin. Pri tio ni informu en la ratpaĝaro.

**11. Eventualaĵoj** – neniu

**15. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaŭdon la 30-an de majo 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund